

Johann Gottfried Hientzsch,

## Kanto de ligo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Fratoj, manon donu kore  
 Kaj senzorge, sendolore  
 Belan horon festu ni!  
 Ĉion teran forĵetante,  
 Daŭru forte kaj konstante,  
 Nia bela harmoni'!

Al la Dio kantu gloron:  
 La spiriton kaj la koron  
 Kial donis la ĉiel' ?  
 Serĉi lumon por vereco,  
 Serĉi virton per justeco  
 Estu nia sankta cel'!

Homoj en la oriento,  
 Homoj en la okcidento.  
 En la sud' kaj en la nord'!  
 Alte teni homan nomon,  
 Kore ami ĉiun homon  
 Estu nia liga vort'.

...

Johann Gottfried Hientzsch,

## Cantus ligaminis

*tradukita de N. N. 06*

Fratres, manus coniungatis!  
 Hora haec festivitatis  
 Ducat nos ad lucidum!  
 Fugiamus, quae non pia!  
 Foederisque harmonia  
 Duret in perpetuum!

Deo gratias ingentes,  
 Qui et animos et mentes  
 Ad perenne genuit!  
 Ius ac lumen comparare,  
 Veritatem non velare  
 Munus nobis sacrum sit!

Optimi in oriente  
 Et sub sole occidente,  
 Ubicumque partium:  
 Verum, probum exercere,  
 Deum, homines fovere  
 Nobis sit propositum!

...

*Traduko de la Germana poemo “Bundeslied” de JOHANN GOTTFRIED HIENTZSCH (\*1787 – †1856) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazarus Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-279-569 (2014-02-15 13:23:44)*

*Tiun ĉi tradukon mi prenis el la interretejo “<http://www.cezarkulturo.de/154385.html>” de Hans-Georg Kaiser (Cezar). Ĝi troviĝas ankaŭ en la kolekto “[www.literaturo.dk](http://www.literaturo.dk)” sub <http://literaturo.dk/novaj.htm>.*

*Traduko de la Germana poemo “Bundeslied” de JOHANN GOTTFRIED HIENTZSCH (\*1787 – †1856) en la Latinan de N. N. 06.*

*Arg-279-568 (2014-02-15 13:11:53)*

*Tiu ĉi latinigo de la kanto troviĝas en la retejo <http://ingeb.org/Lieder/BruderRe.html>. La tradukinto ne estas indikita tie.*